ESPERANTO EN AFRIKO

Numero 24
(2015: 1)

Bulteno de la
Afrika Komisiono de UEA

Karaj gelegantoj,

Baobabo estas giganta arbo sufiĉe konata en multaj afrikaj landoj. Grava ĝi estas pro ĝia imponeco, tiel ke en multaj afrikaj kulturoj oni konsideras gravulon en la socio kiel baobabon. Kiam tiu gravulo forpasas, oni anoncas la eventon kiel forfalo de la sola baobabo en la vilaĝo. Hans Bakker estas sendube baobabo de esperantujo afrika. Lia forpaso estas certe por miloj da afrikanoj foresto de iu gravulo, de iu patro, eĉ de iu avo por la geknaboj. Infanoj kaj genepoj de iu patro rajtas sin esprimi diversmaniere kaj tra diversaj kanaloj omaĝe al la patro aŭ al la avo. Grava parto de tiu numero estas dediĉita por Hans per kondolencoj ne nur de afrikanoj, sed ankaŭ de homoj kiuj kunlaboris kun li. Tiu numero ankaŭ enhavas novaĵojn de sukcesplenaj okazintaĵoj dum la jaro 2014. Ĉiuj komentoj aŭ kritikoj konstruoplenaj estas bonvenaj ĉe adreso de la afrika oficejo de UEA (afrika.oficejo@gmail.com).

La redaktanto

I- Mesaĝo de vic-kunordiganto de AK

La jaro 2014 estis eventoriĉa por la movado en Afriko. Inter la sukcesplenaj eventoj estas okazo de AMO 7 en Togolando. Dum tiu seminario lernis partoprenintoj multon pri starigo de klubo kaj ties efika gvidado. Mi aparte forte opinias, ke la sukceso de iu ajn movado dependas de la kapablo de ties membroj gvidi tute sendepende propran klubon. AMO 7 espereble restos kiel eko de iu nova vento de konsciigo pri efika gvidado de la movado. Al tiu bela atingo dum la jaro 2014 sekvis malfeliĉa novaĵo rilate al forpaso de Hans Bakker, pioniro de la afrika agado. Tia novaĵo, kvankam malfeliĉa, devu esti okazo por posteuloj de la Bakkera epoko daŭrigi kaj plibonigi tion kion Hans jam bone faris. Inter la miloj da afrikanoj kiuj sin konsideras kiel infanojn de Hans, jen bela okazo por flegi la heredaĵon postlasita de ilia patro. Ĉiu el tiuj infanoj decidos pri kiel ĝin flegi je la honoro de la patro. Neniu rajtas diri aŭ postuli al la alia kiel honori Hans Bakker. La rilato inter Hans kaj iu afrika esperantisto A ne nepre similas al tiu kun alia esperantisto B. La afero similas al la situacio de iu patro kiu havas multajn infanojn. Ĉiu el la infanoj havas apartan rilaton kun la patro. Povus okazi, ke inter la infanoj, iu sin konsideras kiel la plej gravan ol la aliaj. Ion tian ni devu eviti en esperantujo. Pri mia nuna sukcesplena vivo ludas Hans ian rolon : mi konatiĝis kun esperantistoj kiuj ŝanĝis mian vivon tra Hans Bakker.

De li mi ankaŭ lernis pri valoroj gravaj por la vivo : kiel junulo, preskaŭ knabo vizitante Amsterdamon dum somero 1994, mi miris pro la modestoplena vivstilo de iu kiun la tuta esperanto-komunumo afrika konsideras kiel gravulon. Detalojn pri tiu unua renkonto mi rakontis en mia tria libreto « Aventuro en mondo de ŝajnigado », kiun Hans Bakker legis kaj gratulis min pro tio dum UK en Bialistoko (Pollando). Dankon elkoran mi ŝuldas al li kaj kaptas la okazon por prezenti kondolencojn al membroj de lia familio, ĉefe al Ans. Pacon al Hans!

Jean Codjo

II- Honore al Hans Bakker

- **Adjevi Adje (kunordiganto de AK)**



Mi havis ŝokon, leginte pri la forpaso de Hans Bakker, sed homoj kiel li neniam mortas. Mi mem ne lernis de li, sed de homoj kiujn li iam instruis. Tiuj ĉi povas pli bone ol mi alparoli vin omaĝe al li. Sed kiel "nepo", mi kompatas al la doloro de la familio Hans kaj benas la memoron de tiu elstara, bonkora, modesta, malavara, humanista... esperantisto. Nun pli ol neniam, ni afrikanoj mem devas daŭre flegi la arbon postlasitan de Hans por iompostioma pliprofundiĝo de la radikoj kaj grandiĝo de la branĉoj tra la tuta Afriko! Miaj sinceraj kondolencoj. *(Foto disponigita de Katalin Kovats)*

- **Latifou Gbadamassi (prezidanto de Benina Asocio)**



Kortuŝita estis mi pri la anonco de la forpaso de S-ro Hans Bakker. Ververe Afriko ĵus perdis la pioniran motoron en la historio de sia Esperanto-movado. Dekoj da afrikanoj povis interŝanĝi leterojn aŭ mesaĝojn kun Bakker sed nur kelkaj havis la oportunon fizike konatiĝi kun li. Mi, kiel bonŝancohava afrika esperantisto, renkontis lin fizike dufoje. La unua fojo estis kiam mi ĉeestis la 57-an IJKon en Strasburgo (29-a Julio- 5-a Aŭgusto 2001) kaj vizitis kelkajn amikojn kaj lokojn en Germanio kaj Nederlando. La dua estis dum la 96a UKo en Kopenhago (2011) kiam li surprize aperis antaŭ mi kaj diris jenon : ''Saluton Latif, mi tute ne povas imagi vin tie-ĉi. Kiel vi sukcesis akiri vizon… ?'' Poste okazis, dumkongrese, alia renkontiĝo kun li, lia edzino kaj Philippe Chavignon el Francio. Je mia propra nomo kaj tiu de ABeE, mi sincere prezentas kondolencojn al lia edzino Ans kaj al la tuta familio. La foto estis farita dum mia vizito ĉe Hans dum julio 2001. En ĝi aperas ankaŭ mia korespondantino Anneke Schouten el Apeldoorn (Nederlando). Mi daŭre memoras realisman konsilon de Hans pri la Movado. Dum la jaro 1994, kiam mi ade deziris starigi klubojn kaj varbi multe da estontajn esperantistojn, Hans skribis jenon al mi : « … pripensu kun Jean (Codjo), ĉu vere la nombro de esperantistoj estas grava aŭ ĉu la boneco de la ekzistanta agado estas pli grava. Pripensu kion vi plej bezonas : legaĵojn

por instali vian klubon aŭ afiŝojn por varbi?» Jen fakte kiel realisma estis Hans. Por li, pli gravas havi bonajn esperantistojn ol multajn nebonajn esperantistojn.

- **Elisée Byelongo (Sudafriko)**

La patro de esperanto en Afriko ripoziĝas. Temas pri Hans Bakker, pioniro de esperanto-instruado ne nur en la nigra Afriko sed ankaŭ en aliaj partoj de la mondo. Li estas patro de multaj afrikaj esperantistoj pro tio, ke li instruis esperanton al nepagipovuloj, al junuloj kaj al ĉiutribaj afrikanoj. Li instruis kun ĝojo kaj sindoneme[…] Ĉar la patro havas infanojn kiuj jam maturiĝis, ĉu en Togolando, ĉu en Kongo, ĉu en Sudafriko. La patro Hans elektis instrui demokratie esperanton al la cetera mondo[…] Li konsideris ĉiun kiel amikon.

- **Henriel (Malagasio)**

Mi malĝojas aŭdinte la forpason de Hans Bakker. Mi ja perdis amikon kaj samideanon. Mankas al mi vortoj por esprimi tion, kion mi sentas interne de mi. Hans Bakker estis ne nur esperantisto, sed precipe HOMO, kiu ĉiam klopodis kompreni aliajn homojn. Ne nur kompreni sed ankaŭ amis siajn samsortanojn. Hans Bakker helpis Afrikanojn ĉar li kredis ke Esperanto povas esti utila al ili kaj li estis konvinkita ke Afrikanoj povas esti utilaj al Esperanto. […] Li persiste helpadis Afrikon ĝis sia lasta viv-spiro. Nome de Afriko, nome de UME kaj de ĉiuj malagasaj esperantistoj, mi omaĝas al tiu eksterordinara samideano, kiun ni devas imiti per nia ago kaj parolo. Vi ripozu en paco, mia kara Hans Bakker, ni neniam forgesos vin.

- **Bernard Gnancadja (Benino)**

Mi mem ne konas Hans Bakker, eĉ neniam korespondis kun li. Sed de li lernis esperanton tiu kiu intruis esperanton al mia Esperanto-instruisto en la lernejo Jules Verstraeten en Benino. Do, mi povas konsideri lin kiel avon mian. Je la nomo de aliaj gejunuloj kaj geknaboj el la sama esperanto-lernejo kiun mi frekventis, mi prezentas kondolencojn al familio de Hans Bakker.

- **Pierre Houenavo (Benino)**

Mi havis la privilegion renkonti Hans Bakker dum UK en Roterdamo. Antaŭ tio, mi multe aŭdis pri lia agado en Afriko. Li instruis al preskaŭ ĉiuj afrikaj pioniroj, precipe tiuj de Benino. Unu el ili estis mia instruisto. Laboro de Hans certe daŭros kaj li restos neforgesebla por la afrika movado. Kondolencojn al ĉiuj membroj de lia familio.

- **Renato Corsetti (Italio)**

Forpasis Hans Bakker. Tute prave oni nomas lin "patro de Esperanto en Afriko". Fakte antaŭ li estis eŭropaj esperantistoj loĝantaj en Afriko, estis la provoj de Tibor Sekelj informi pri Esperanto en afrikaj landoj, estis la ideoj de TEJO, kiu eĉ havis kelkajn afrikajn aktivulojn komence de la 70-aj jaroj kaj ĉefe havis la ideon, ke la Esperanto-movado ne devas resti eterne eŭropa. Sed la vera efektiviganto de tio estis Hans Bakker per regula kaj postula laboro de sia hejmo. Li metis anoncetojn en afrikaj revuoj kaj korespondis kun la interesiĝantoj. Hans sukcesis enplekti la tutan eŭropan movadon, kiu volonte helpis sendi lernomaterialon, korespondi kun la lernantoj, helpi la lernantojn okaze de vojaĝoj al Eŭropo. Kio restas el tiu grandega laboro? Multaj parolantoj de Esperanto sed malmultaj esperantistoj. La generacio de la lernintoj de Hans ne ĉiam vere transformiĝis al afrikaj Hans-oj, al disvastigantoj de Esperanto en Afriko pro nur idealaj celoj. Nun post jardekoj, tamen, tio estas pli kaj pli komprenata. Efektivigi tion nun estas la tasko de la Afrika Komisiono de UEA, kiu devas eduki la afrikajn esperantistojn al sindediĉo al la afrika movado nur pro la movado kaj ties idealoj. Nun estas la momento fari al Hans grandan donacon: igi la afrikan movadon sendependa de Eŭropo.

- **Stefan MacGill (Vicprezidanto de UEA)**

Ankau mi tre malĝojas audi pri la forpaso de Hans Bakker, kiun mi bone konis el miaj tempoj en la Centra Oficejo de 1976-86. En tiu tempo Hans aktivegis en TEJO - ĉefe pri eksteraj rilatoj - kaj jam konstruis la fundamenton por la afrika agado. La vizaĝo de Esperanto en la kontinento estus ege malpli riĉa sen tiu persista laboro de Hans kaj la teamo. Mi mem memoras la grupon de afrikanoj, kiuj pasigis monaton en Hungario, prepare al la partopreno en la jubilea kongreso en Varsovio en 1987 - projekto kiun Hans mem starigis kaj gvidis. Granda perdo por ni ĉiuj!

- **Assane Faye (prezidanto de senegala asocio)**

Nome de Senegala Esperanto-Asocio mi kondolencas la tutan esperantan familion kaj precipe Afriko pro la forpaso de Hans Bakker.Niaj pensoj iras ankaŭ al siaj proksimaj kunlaborantoj kaj familianoj!

- **Prince Henriko (Niĝerio)**

Kun kordiŝiro kaj granda doloro mi ricevis la informon pri la morto de la Patro de Afrika Esperanto Movado HANS BAKKER. Al mi estis preskaŭ nekredeble ĉar ni interŝanĝis mesaĝon pri ebla renkontiĝo dum mia vizito al Polando kaj Germanio kaj li informis ke pro malsaneto kaj malforto, ni ne povis renkontiĝi kaj antaŭ tri tagoj alvenis mesaĝo de li ke li provizore ne respondos al poŝtajoj. La tuta Afriko al kiu li dediĉis plejparton de sia vivo ne forgesos lin kaj ni la disĉiploj daŭre subtenos liajn revojn por Esperanto en Afriko. Aliĝu min en la periodo de honoro kaj funebrado.Eterne en niaj memoroj.Adiaŭ HANS BAKKER

- **Agbolo Apelete (Togolando)**

Mi povas per tiuj ĉi vortoj de Sankta Paŭlo omaĝe al Hans Bakker, diri: “Mi batalis la bonan batalon, mi finis la kuradon Kaj mi gardis la fidon ; de nun estas konservita por mi la krono de justeco, kiun la Sinjoro en tiu tago donos al mi“. 2Tim 4, 7. Kondolencojn al la familio.

- **Daniel Tuo (Kotdivuaro)**

Kaj li forviŝos ĉiun larmon el iliaj okuloj; kaj la morto jam ne ekzistos; ne plu ekzistos funebro; nek plorado; nek doloro, la unuaj aferoj forpasis (Sankta Biblio, Apokalipso 21 : 4)
Ne mi ploros pri li, mi preĝos por mi mem, por esperantistoj vivantaj kaj por esperanto-movadoj en Afriko kaj tra la mondo. Ni subtenu la familion de Hans Bakker kaj unu la aliajn.

III- Agade tra Afriko

A- Nacia kongreso en Togolando



La 22-a Togolanda Esperanto Kongreso (TEK), kiu komenciĝis hierau en Instituto Zamenhof (IZo) ĵus finiĝis sobre. En la mateno mi prelegis pri la ĉeftemo: "Konsciiĝo en la uzado de Esperanto", kiun ĉiuj sekvis atenteme. Fakte, per tiu prezento mi priskribis per argumentoj drastan kaj vivan bildon pri la neceso de nacia kongreso, la graveco de tiu kongresa temo en la nuna etapo de la vivo de landa Asocio (UTE), konsciigo pri tio, ke la kerno de la asocia vivo ja estas homoj, ĉar sen homoj asocio ne povas ekzisti. La ĉeestantoj simile lernis pri la idealo de Esperanto, kiun ĉiuj devas alpreni por sia propra bono, por la bono de aliuloj kaj por bono de nia lando. La prelego finiĝis per prezento de kelkaj statistikoj kaj diagnozo por distingi kaj aparte atentigi la fortajn kaj malfortajn punktojn de la landa asocio por proponi eblajn solvojn kaj strategion al sukcesa renaskiĝo de UTE. Ĝenerale, la kongresaj laboroj disvolviĝis en bona etoso, kvankvam rimarkita estis forta partopreno de la gelernantoj de IZo. La aktivaĵoj kroniĝis per la renovigo de la gvidinstancoj de UTE, kiujn mi preferis forlasi por pli konvene tiam dediĉi min al personaj aferoj kaj al mia sano kiu foje kauzas malhelpon. Kompreneble, mia retiĝo neniel endanĝerigas la organizadon de la sepa AMO, kies preparlaboroj plu iras antauen. Male, nun mi disponos pri iom da libera tempo por multe pli aktive kaj serene labori prioritate por AMO7 kaj UEA en Togolando. Sed jam UTE estas en bonaj manoj, ĉar ĝin ekprezidas juna kaj multjara aktiva esperantisto, nome s-ro Attaglo E. Kokou, kaj s-ro Agbolo A. Didier plu estros la komitaton por la dua mandato, dum la praktikaj faroj de la junulara sekcio JOTE estos direktitaj de s-ro KEDE GADJI k. Hézékièl por la nova oficperiodo 2014-2016. Menciindas, ke ambau lastaj personoj estos inter la sepaj AMantoj.

Ĉion plej bonan kaj kuraĝon al la novaj funkciuloj de UTE !

Adjevi (Eksa prezidanto kaj komitatano C de UTE)

B- Burundo: Preparo de tutunua IJK en Afriko.



Pro forta motivo de burundaj junaj esperantistoj organizi IJK-n en 2017, la Prezidanto de TEJO ĵus faris viziton al ĉi-tiu lando en orienta Afriko. La celo de lia vizito estis renkonti la organizontojn de la kongreso. :i esploris eblajn IJKejojn kaj ankaŭ la esperantan centron en Burundo. Łukasz alvenis al Burundo la 1-an de Februaro kaj ĉe la flughaveno, kie 17 junuloj de Bujumbura, la Prezidanto, kasisto kaj vickasisto de ANEB atendis lin. Kun granda ĝojo ili kondukis lin al apuda muzeo, kie okazis bonveniga ceremonio. La Prezidantoj de ANEB kaj de JEBUO prezentis respektive la du asociojn. La saman tagon, ni vizitis du hotelojn kiuj estas apud la ebla IJK-ejo. Je la 16-a horo, ni vizitis la junularan centron de Kamenge kaj havis diskuton kun ties estro kiu akceptis okazigon de instruado de esperanto en sia centro. Lundon ni vizitis la IJK-ejon, loko kiu ege plaĉis al la Prezidanto de TEJO ĉar ĝi enhavas ĉion, kio estas bezonata por la kongreso je perfekta kaj malmultekosta.
Vesperon, ni vizitis la klubon en Bujumbura, kie la Prezidanto de JEBUO, S-ro Mlossi instruas. Mardon, ni vojaĝis al Rumonge kie estas la esperanto-centro. Okazis vizito al la urbestro, sed pro manko de tempo, li ne povis akcepti nin. Tamen, la policestro ricevis nin kaj diskutis pri ebleco instrui esperanton al policanoj. Vesperon, venis amaso da komencantoj kaj diskutis kun la Prezidanto de TEJO. Dank' al kampanio pri monkolektado organizita de TEJO, la centro ricevis komputilon kaj televidilon. Merkredon, ni vizitis la klubon de Gasanda kaj tie ni parolis kun esperantistoj kaj neesperantistoj. Estis planite anakaŭ viziti Nyanza lac, sed pro forta pluvo, ni ne sukcesis iri tien. Ĵaudon, ni vizitis Ngozi, provincon kiu estas en norda parto de Burundo kaj la vojaĝo daŭris pli ol 4 horoj. Tie estis interesa grupo de esperantistoj, kaj ili interalie spektis filmon pri IJK kaj ĝia organizado. Ĉiuj vizititaj ejoj kaj kluboj konsciigis nin pri manko libroj kaj la Prezidanto de ANEB promesis ke li klopodos iel aranĝi. La Prezidanto de TEJO ankaŭ rimarkis pri nombro tute malalta de esperantistinoj. Pri tio kulpas la socia kaj tradicia vivistilo kiu ĝenerale donas tute apartan rolon al inoj. Tamen iom post iom interesiĝas inoj al la movado. Eble necesas aparta traktado kaj avantaĝo por kuraĝigi pliajn virinojn lerni esperanton kaj movadumi.

C- Benino : Projekto pri lernado de esperanto per lokaj lingvoj.

En Afriko kaj aparte en Benino, publika intereso rilate al Esperanto estas tre malalta pro multaj kialoj. Multaj Afrikanoj konscias hodiaŭ, ke kolonia sistemo militis favore, ne al afrikaj sed al eŭropaj lingvoj ĉefe la angla, la franca, la germana, la hispana, la portugala ktp. Estas mastruma sistemo kiu rekte aŭ ne-rekte igis afrikanojn malatenti pri siaj gepatraj lingvoj. Tamen, lingvo estas kulturo.

Vole, nevole, afrikanoj uzas tiujn vivantajn lingvojn supre menciitaj kiel oficialajn lingvojn en siaj respektivaj landoj. Tamen, afrikanoj estas ĉiam deteniĝemaj rilate al lernado de ĉiu alia lingvo kies kreinto estas blankulo, Zamenhof kun Esperanto ekzemple. Afrikanoj certe plu interesiĝus pri lernado de tia lingvo se ĝi okazas tra elemento de sia kulturo aŭ konsideras ambaŭ kulturojn, t.e. loklingva-esperanto. Tial mi decidis starigi la

Projekton ‘’Lerni Esperanton per lokaj lingvoj’’. Notindas, ke temas pri afrikaj lingvoj. Tiel ĝi iĝas nova agado de la Ne-Registara Organizo ‘’Infanoj Ĉirkaŭ Afriko’’ kies fondinto estas Latifou Gbadamassi.

La projekto celas:

- pli facile varbi novajn esperantistojn, tiel kreskigante la nombron de Esperanto-uzantoj aŭ esperanto-parolantoj

- instigi ne-esperantistan publikon interesiĝi pri Esperanto

- ebligi al akiro de baza scio en gepatraj lingvoj (alfabeto, nomo de bestoj, de fruktoj, de manĝoj, numeraloj, ktp.) kaj samtempe en Esperanto

- konigi Esperanton al loklingvaj alfabetizuloj kaj doni al ili la okazon lerni la verdan lingvon por povi ĝui ĝin poste

- konigi al eksterafrikanoj la afrikan kulturon ĝenerale kaj la beninan aparte (loklingvaj alfabetoj kaj ceteroj, tradicio, kutimoj, ĉiutagaj travivaĵoj ktp.)

Esperantaĵoj faritaj por la projekto

Kadre de la projekto, diversaj esperantaĵoj, ĉefe libroj, estas verkitaj de S-ro Latifou GBADAMASSI el Benino kun helpo de fakuloj pri alfabetizado. Menciindas, ke tiu projekto subteninda bezonas apogon de la tuta mondesperantistaro. Por kovri la altajn elspezojn rilate al ĝi (akiro de materialoj, traduko kaj multobligo de la libreto en multaj aliaj afrikaj lingvoj, kostoj rilate al provlegado de fakuloj pri alfabetizado ktp.), li proponas, ke vi aĉetu libretojn verkitajn de Latifou kaj kies profito financos agadon de la organizo. Kompreneble, eblas lerni lokajn lingvojn per ili por eksterafrikanoj, sed vi ankaŭ povas donaci ilin al afrikaj esperantistoj.

Jenaj titoloj estas disponeblaj ĉe libro-servo de UEA :

1-ABC ɖo FƆNGBE kpó ESPERANTOGBE kpo Mɛ/ABC en la FONGBEA kaj ESPERANTO

2- ABC LE AJAGBE koɖo ESPERANTOGBEMɛ/ABC en la AĜAGBEA kaj ESPERANTO

3- ABD ni ÀWORÀN ni ẸDÈ YORÙBÁ atí ẸDÈ ESPERANTO/ABD BILDE en la JORUBA kaj ESPERANTO

4- ABC ɖo KOTAFƆN kpó ESPELANTOGBE kpo Mɛ/ABC en la KOTAFONGBEA kaj ESPERANTO
1-ABC ɖo FɔNGBE kpó ESPERANTOGBE kpo Mɛ, 78p. A4, € 5,00

2-ABC LE AJAGBE koɖo ESPERANTOGBEMɛ, 86p. A4, € 6,00

3-ABD ni ÀWORÀN ni ẸDÈ YORÙBÁ atí ẸDÈ ESPERANTO, 82p. A4, € 5,00

4-ABC ɖo KOTAFɔN kpó ESPELANTOGBE kpo Mɛ, 78p. A4, € 5,00

5- La FONGBA en 12 lecionoj por esperanto-parolantoj, 96p. A4, € 7,00

6- La KOTAFONGBEA en 12 lecionoj por esperanto-parolantoj, 74p. A4, € 7,00

Latifou Gbadamassi

D- Benino: unua grava paŝo al esperantigo de virinoj



Ĵus finiĝis la unua Seminario en Kotonuo en Hotelo JoCa pri kapabligo de virinoj en gvidaj roloj, « Unua Kontakto » kun Esperanto kaj legado kaj skribado de la fonua lingvo, ĉefa benina lingvo. Plena semajno en formo de studcela kunloĝado. Partoprenantinoj estis 11 virinoj en la aĝo de 21 ĝis 29, ĉiuj en supera studado. La kunmetado de tiuj tri temoj montriĝis tre adekvata. Jes fakte, ĉar la fonua lingvo firmigas la radikojn de beninanoj, kaj Esperanto donas aliron al la tuta mondo. Kaj tian malfermitecon gvidantinoj bezonas por efike labori en sia medio, ĉu profesia, ĉu politika. La partoprenantinoj substrekis la taŭgecon de la triparta enhavo. Post partopreno en la solena malfermo la Direktoro de la ŝtata oficejo pri naciaj lingvoj Sinjoro Zossou telefonis ĉiutage por informiĝi pri nia laboro. Li sendis po 20 librojn pri beninaj proverboj (dulingva eldono franclingva kaj fonulingva) kaj alian verkon en la fonua. La partoprenantinoj tre ĝojis kapabli kanti la beninan nacian himnon en la fonua lingvo. Mirejo filmis tiun kantadon, la filmo estos transdonita al la direktoro Sinjoro Zossou. Gvidantoj estis kvar : Privas Tĉikpe kiel ĉeforganizanto, prezidanto de SSB kaj instruisto de Eo, Ĉristophe Hounto-Ada, instruisto pri alfabetigo en la fonua lingvo, Ladislas Tande kiel kunordiganto kaj prizorganto de la temo « virinoj en gvidaj roloj » kaj Mireille Grosjean, instruisto pri Eo kaj prizorganto de la temo « virinoj en gvidaj roloj ». Vizitis la grupon Sinjoro Jean Fande, profesoro pri franclingva literaturo en la Universitato de Abomey-Calavi (ĉefa universitato de Benino) kaj Sinjoro Jean-Benoit Alokpon, prezidanto de la Asocio de profesoroj pri la franca lingvo por Afriko kaj Hindoceana Regiono. La partoprenantinoj trapasis ekzamenon laŭ programo « Unua Kontakto » ; el dekunu dek sukcesis kaj ricevis atestilon. Du sukcesis kun mencio TRE BONE, 7 kun mencio BONE kaj 1 kun mencio KONTENTIGE. Ĉiuj ricevis partoprenatestilon pri la seminario. Ĉiuj esprimis sin pozitive dum finanaliza kunveno, dankis al SSB pro tiu evento, kiu estis tre favora oportuno por ili. Per tiu evento ili povis ne nur multon ekscii, ekzerci kaj lerni, sed plie ili povis inter si konatiĝi kaj komenci kreadon de persona reto, kio tre gravas en altnivela kariero.

Fotoj vidiĝas tie : http://mirejo3.blogspot.com/2015/01/fonua-lingvo-esperanto.html

La UEA-konto de « Scio Sen Bariloj » estas assb-k

Kotonuo, la 24an de januaro 2015

Nome de « Scio Sen Bariloj »

Privas Tĉikpe, prezidanto

Mireille Grosjean, kasisto

IV- Afriko zamenhofas

A- Zamenhofa tago en Koĝi (Benino)



La ĉi-jara zamenhoffesto estis organizita de la ĵus kreita nova klubo en Koĝi. Indas aldoni, ke la pli multo de membroj de tiu klubo estis iamaj gelernantoj de la lernejo Jules Verstraeten. Nun la zamenhofa tago ekiĝas bela okazo por tiuj gejunuloj, ĉefe por tiuj kiuj loĝas for de la vilaĝo pro studado, ĉu ĉe la universitato, ĉu ĉe la duagrada lernejo. La ĉi-jara festo okazis la 20an de decembro, ĉar la 15a estis lundo. Tia festo estas pli taŭga dum semajnfino. Ĉeestis la feston pli ol 50 homoj, interalie 20 geknaboj de la lernejo Jules Verstraeten. Kio novas pri tiu festo, estas ke la organizintoj ne plu estas la jam konataj aktivuloj, sed nur freŝbakitaj esperantistoj. Aktivaj esperantistoj kiel Pierre Houenavo estis invititaj. Estis bela okazo por Pierre rakonti pri historio de la lernejo parte financita de germanaj esperantistoj. Bernard, prezidanto de la junulara sekcio en Benino (BOJE) ankaŭ rakontis pri neceso revigligi tiun sekcion. Li kalkulas je aktiva partopreno de la ĵus bakitaj esperantistoj. Poste okazis futbalmaĉo kaj la festo finiĝis per trinkado de teo kaj pecetoj de pano. La plej junaj geknaboj dancis kaj finfine la grupfoto okazis antaŭ la monumento konstruigita memore al Jules Verstraeten kaj sinjoro Hauge. Dankvorto iru al tiuj kiuj finance kontribuis al okazo de la festo, ĉefe al la geknaboj, kiuj ankaŭ kontribuis.

Bernard Gnancadja.

B- Senegalio

La 14-an de Decembro 2014 okazis tra la mondo festo de Zamenhof. La Senegalia Esperanto Asocio ankaù kunfestis. Ĝi okazis en urbo-domo de Rufisko kun tre riĉaj programoj. Alveno de kunvenantoj je la 10a. Post ekspozicio de esperantaĵoj ekis ceremonio kun unu silenta minuto por forpasitaj esperantistoj. Sinjoroj Woudji Kossi kaj Ababacar Faye gvidis la kunvenon. Unue sinjoro Woudji prelegis pri la vivo de Zamenhof kaj pri ties atingoj por la lingvo. Poste sekvis sinjoro Babacar Faye kiu insistas pri la historio de la lingvo. La tuto daŭris unu horon. Kompreneble, li ankaŭ menciis pri okazo de la 100a universala kongreso kiu okazos en Francio, en la urbo Lille. La festo finiĝis en granda etoso per esperantaj kantoj.

Woudji Kossi

C- Togolando: Zamenhofa tago iĝas neforgesebla tradicio

Memore al la naskiĝdato de Zamenhof okazis en la restoracio « Beulah-land » renkontiĝo. Fakte laŭprograme, prelegoj vere ne okazis sed anstataŭe salutvortoj de s-ro Kouevigan Koffi, prezidanto de APETo (organizanto de la Tago) pri la neceso daŭrigi la tradicion pri la Tago de Zamenhof en Togolando kaj aparte sine de nia

rondo. Sekvis instigaj kaj invitaj vortoj al ĉiuj ĉeestantoj fare de s-roj Agbolo Apelete pri la 22-a nacia esperanto-kongreso, okazonta sabate la 20-an en Instituto Zamenhof (Lomeo), kaj mi fermis la serion de unuopaj vortumadoj per informoj pri la AMO-7. Poste, la dioj de retoj verŝajne estis kun ni, tiel ke ĉiu el la partoprenantoj siavice povis skajpe babili kun esperantisto en Francio kaj poste en Usono sen alfronti iun teknikan problemon dum horoj, kio raras en Togolando, kie la retkonekto estas plejofte malbona. La Tago fermiĝis per kunmanĝo de tipaj pladoj kaj karaokeo. La etoso estis interfratiga, bonega kaj ni pasigis kune tre agrablajn kaj ne forgeseblajn momentojn. Dankon al ĉiuj partoprenintoj.

Adjevi Adje

V- AMO en Togolando

A- Salutvorto de vicprezidanto de UEA

Mi tre ĝojas nome de Universala Esperanto-Asocio saluti la sepan el niaj seminarioj pri Aktivula Maturigo – pli koncize, pri AMO. Ni deziras al vi riĉan programon kun multaj ebloj interveni, diskuti kaj plani. Estas aparte ĝojige, ke la AMO-programo povas jam en sia unua ekzistojaro eniri Afrikon, tiel ke ni okazigis seminariojn el kvar el la kvin kontinentoj. Togolando kaj aliaj landoj en la kontinento havas specifajn bezonojn, sed ili estas urĝaj bezonoj sur plej vasta kampo da agadterenoj: informado, instruado, organizado, stimulado de lokaj grupoj, translima kunlaboro, ekuzo de novaj teknologiaj ebloj, pretigo aŭ akiro de konvenaj studmaterialoj, kontaktado kun Unesko kaj similaj organizoj. Apenaŭ troveblas kampo, kiu ne bezonas grandan atenton, kaj bonkvalitan trejnadon. Feliĉe multaj el viaj samideanoj estas junaj kaj aktivemaj. Ni deziras, ke AMO-seminario povu okazi en Afriko ĉiujare; vi jam faris proponon por 2015, kiun ni lastatempe akceptis. Same ni imagas seminarion ĉiujare en Azio kaj Ameriko – kaj iam – eĉ en Oceanio. Dilemo por vi estas decidi kie agi kaj kiel tion fari per limigitaj rimedoj. Eble por nun tro ambicias imagi movadon en ĉiu lando de la kontinento – pli bone koncentri la fortojn en landoj, kie jam ekzistas establita bazo. Iom post iom tamen, pere de la Afrika Komisiono, indas esplori la landojn sen ekzistanta movado aŭ kie ĝi malfortas, kaj decidi, kiuj estus la du/tri aŭ eble kvar/kvin, kiuj plej konvenas por direkti la atenton. Tiucele, FLAM-analizo povas utili – ni ja uzis tion kelkfoje en aliaj seminarioj. Via decido el la lasta Afrika Kongreso konsistigi la Afrikan Komisionon kun reprezentiĝo el ĉiuj ĉefaj partoj de la kontinento donas bonan bazon por tia planado. Ni rekomendas, ke la seminario inkluzivu pritaksan sesion fine, kaj inter la taskoj de tiu konkluda sesio estas formuli listeton da rekomendoj, konvenaj por la afrika kunteksto. Ni sopiras ricevi tuj ĉe la fino de la seminario koncizan raporton, kiun ni povos tuj dissendi al la mondo, kune kun kelkaj fotoj. Kiam via seminario finiĝos, la oka jam ekos kun mia partopreno, sed el Germanio, mi povos tuj dissendi vian komunikon al la mondo. Poste povos sekvi artikolo por revuo *Esperanto*, kaj pli detala resumo pri la aranĝo. Ni esperas, ke viaj seminarianoj povos alveni el kelkaj landoj, kun rezulto, ke viaj laboroj portu utilajn fruktojn.

Ĉion bonan por via seminario!

Stefan MacGill
Vicprezidanto de UEA
Komisiito de ILEI pri la retkurso 'Esperanto Etape'.

B- Parolado ĉe fermo de AMO 7

Karaj seminarianoj,

Jen ni ĉe la fino de tiu ĉi AMO-programo, la 7-a de Universala Esperanto Asocio. Ĝi donis al ni eblon akiri utilajn sciojn kaj spertojn ĝenerale pri diversaj aspektoj de Esperanto-laboro por pliaj kaj pluaj paŝoj al kreskigo de nia komunumo, kiu mem festas la Jaron Montevideo en tiu ĉi jaro, memore al la unua rezolucio de UNESCO favore al nia lingvo en 1954. Multon ni interdividis en niaj aktivaĵoj dumseminariaj. Espereble, vi daŭre nutros la akiritajn konojn per la plustudado de la ricevitaj materialoj dumseminarie. Ili certe helpos vin pripensi novajn perspektivojn por via esperanto laboro. UEA kaj Afrika Komisiono estas pretaj kaj ĝojos subteni vin en la limo de disponeblaj rimedoj, se vi decidos mem inviti similan seminarion en viaj respektivaj landoj. Kiel frue dirite, via partopreno en tiu seminario pri Aktivula Maturigo nun donas al vi gravan taskon daŭre instigi viajn landajn aktivulojn kaj gvidantojn pri nia rolo disvastigi Esperanton, instrui kaj baki esperantistojn unuavice kaj labori por proksimigi pliajn homojn al UEA-agadoj. Ni estos ĉiam en la rilato kun vi por plŭelpi, laŭnecese. Afrika Komisiono kaj togolandaj esperantistoj dankas vin ĉiujn pro la partopreno kaj esprimas grandan dankon al kursgvidintoj kaj al ĉiuj kies klopodoj igis sukcesa nian seminarion: UEA, Eŭropaj kaj ĉefe Aziaj samideanoj, kiuj sendis financajn subtenojn. Multan dankon ankaŭ al s-ino Grosjean Mireille el Eŭropo kaj pli precize el Svislando. Dankon al ĉiuj niaj afrikaj samideanoj kiuj venis de diversaj landoj afrikaj. Estis por mi agrable havi kaj labori kun vi ĉiuj en AMO- etoso dum tiuj tri kvar tagoj. Mi persone ĝojos denove revidi vin dum Esperanto-aranĝo iam ie en la Esperantujo.

Bonan rehejmiron al vi ĉiuj. La nova jaro 2015 estu agrable neforgesabla por vi. Dankon.

Adjé Adjévi (Kunordiganto de Afrika Komisiono)

C- AMO: Oficiala raporto



Kunvenas en Lomeo, Togolando, 25 lertaj esperantistoj el 4 landoj : Ebura Bordo, Niĝerlando, Benino kaj Togolando. Pluraj montris grandan ĝojon revidi konatulojn. Malfermis la unuan kunsidon Didier Apelete AGBOLO, estro de la nacia Komitato de Unio Togolanda por Esperanto (UTE) kaj preleganto de AMO7. Poste parolis Adjévi ADJE, kunordiganto de Afrika Komisiono de UEA, eks-prezidanto de UTE kaj ĉefa organizanto de AMO 7. Alvenis Kokou Marcus ATTAGLO, prezidanto de UTE kaj li bonvenigis ankau la partoprenantojn. Partorpenantoj lautlegis salutmesaĝojn de Stefan MacGIll, vic-prezidanto de UEA kaj respondeculo pri la programo AMO, de LEE Jungkee, estrarano de UEA pri Afriko, de Renato CORSETTI, eks-prezidanto de UEA kaj konsilanto de Afrika Komisiono, de Jean CODJO, vic-kunordiganto de Afrika Komisiono de UEA. Aperis 8 ĵurnalistoj el 4 amaskomunikiloj dum la solena malfermo. Ili abunde fotis kaj intervjuis la organizantojn kaj prelegantojn.

Matene Mireille Grosjean prezentis per multaj fotoj Unuiĝintajn Naciojn. Poste la partoprenantoj ricevis taskon solvendan en grupoj : kiel prepari sin al kunveno kun ĵurnalisto au alia gravulo.

Posttagmeze Didier Apelete Agbolo, profesia retmastro, gvidis la partoprenantojn en konstruon de retejo. 8 komputiloj estis je dispono, same projekciilo kaj ekrano ; konsekvence ĉiuj povis en etaj grupoj sekvi la malkovron de la programo << web page maker >>. Tuj la junuloj improvizis kreante amuzajn paĝojn per tiu tre simpla ilo. Sciendas, ke la preparo de Mireille Grosjean por tiu seminario interesis la gvidantojn de la Popola Afrika Alternejo de Ĝenevo, kie ŝi estis en novembro 2014 dungita por doni tiun lertigadon. Do nia Esperanto-movado helpas al publika instanco.

Mireille Grosjean

D- Impresoj pri AMO

- **Latifou Gbadamassi (prezidanto de benina asocio)**

Mi persone havis bonajn kaj pozitivajn impresojn pri la 7-a AMO pro tio ke, ĝi okazis en tre bona amikeca kaj frateca etoso. La temoj pritraktitaj estis trafaj kaj instrue riĉoplenaj. Certe, per la akiritaj scioj kaj spertoj, ni pli efike agados por antaŭenigi la movadon en niaj respektivaj landoj.

- **Issoufou Kooba (Niĝerlando)**

La seminario okazis en tre bonaj kondiĉoj. Estis tabulo por skribi, komputiloj, projekciilo, ekrano, paperfoliegoj kaj skribiloj por skribi kaj la manĝoj estis bonkvalitaj. Mallonge, la tuta dumseminaria aktivaĵaro plaĉis al mi kaj mi pensas ke same ĉiuj partoprenantoj ĝuis kaj profitis la etoson. La rilatoj inter ĉiuj estis harmoniaj. Koran dankon al ĉiuj seminarianoj kaj ĉefe al la prelegantoj. Mi kaj mia samlandano havis tre pozitivajn impresojn, kiujn ni sendube dividos kun aliaj kiam ni revenos Niĝerlanden.